

Annette von Droste-Hülshoff,
Lastaj vortoj (2)

tradukita de Manfred Retzlaff

2a versio

Karuloj, kiam pasis mia
Spirit', pri mi ne ploru vi;
Ĉar lumas jen en paco Dia
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro
Memoru daŭre mi pri vi,
Por viaj vundoj kaj doloro
Mildigon volas peti mi.

Se venas kun flugilo sia
La nokta paco al la Ter',
Ne pensu plu pri tombo mia,
Salutas mi el stela sfer'.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.*

MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)

La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de la traduko de Josph Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer'". En mia unua traduko-provo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.

Annette von Droste-Hülshoff,
Lastaj vortoj (0)

tradukita de Manfred Retzlaff

Laŭvorta Esperantigo

Amatoj, kiam forpasis mia spirito,
ne postploru min per iu larmo;
ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco,
tie lumas al mi eterna tago.

Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaperinta,
ne foriĝu via bildo al mi,
kaj mildigon por viaj vundoj,
por via doloro volas mi elpetegi.

Se dum la nokto blove svingas siajn seraf-flugilojn
la paco super la mondo-regnon,
ne pensu tiam plu pri mia tombo,
ĉar el la stela spaco mi salutas vin.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.*

Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)

Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto